

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo vendredon la 19an de aprilo 2013, per Skype.**

(Protokolo aprobita la 6an de junio 2013.)

## **Partoprenis:**

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Anne Karin Bondhus en Bryne  
Eli Eriksen Fitjar en Bergen  
Mario Machlik en Tromsø

## **0. Tagordo**

Aprobita.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 15an de marto 2013**

La protokolo estis aprobita.

## **2. Ekonomio**

La kasisto raportis pri la ekonomio:

Skagen Vekst      kr 33 762

Skagen Høyrente   kr 62 017

## **3. Jarkalkulo 2012**

La jarkalkulo preskaŭ pretas. Ni traktos ĝin retpoŝte.

## **4. Jarraporto 2012**

Mankas nur kelkaj informoj kaj alineoj. Ni finos la laboron retpoŝte.

## **5. Strategia plano 2013–2017**

La strategia plano priskribu kiel la organizo komprenas la mondon, kaj ĝi estu la fono de la laborplano. La Landa Kunveno traktos ambaŭ planojn ĉi-jare. En sia propono por nova strategia plano la estraro koncizigis la tekston de la ĝisnuna strategia plano per revortumoj kaj forigo de nenecesaj vortoj, kaj ankaŭ konkretigis kelkajn punktojn. La celo estis igi la enhavon pli klara. Do la enhavo restas kiel antaŭe. Ni dum longa tempo deziris plene trapensi la strategian planon kaj verki novan, sed mankis al ni la laborkapacito.

## **6. Laborplano 2013–2015**

Ni trovis la konsiderojn en la ĝisnuna lanorplano taŭgaj, kaj por nia propono al la Landa Kunveno ni ŝanĝis nur detalon pri la vortara laboro, kiu origine estas projekto de Grupo Esperantista de Trondheim. La ĝisnuna ĉefa laboranto dum jaroj ne havas kapaciton labori pri ĝi, kaj GET diskutos la aferon antaŭ la somero. Ni ŝanĝis «La estraro prioritatas havigi monon por akceli pluevoluigon de la vortara datumbazo» al «La estraro donu ĉiun eblan helpon al la vortara laboro».

## **7. Landa Kunveno 2013**

a) Ni fiksas la oficialan tagordon.

- b) Por la tagordo la estraro proponas al la Landa Kunveno: «La dumviva kotizo de NEL estas hodiaŭ proksimume 9-foje pli alta ol la ordinara plenkreska kotizo. La estraro proponas ke la dumviva kotizo egalu al la ordinara kotizo 25-oble, same kiel en UEA.»
- c) Ni decidis pri gvida detala horaro, por helpi al la kunvena prezidanto.

### **8. Malsekretigo de estraraj protokoloj**

En 2008 kaj 2009 la estraro de NEL laboris pri la Reĝa Arĝenta Medalo Pro Merito, kiun reĝo Harald asignis al Elna Matland en 2009. Ŝi ricevis la medalon de la vicguberniestro de Hordaland, Rune Fjeld, dum aranĝo en Bergen la 18an de septembro 2009. Interalie pro juraj kialoj ni devis teni la protokolajn punktojn pri la afero sekretaj ĝis tiu dato. Hodiaŭ la estraro decidis levi la klaŭzon pri la koncernaj punktoj. Temas pri la jenaj protokoloj: 15.05.2008, 23.04.2009, 06.07.2009, 16.07.2009 kaj 27.08.2009.

### **9. Eventualajoj**

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:40–21:33.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 31an de majo 2013 (prokrastita ĝis la 6a de junio).

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.